

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2009:2

Instituto Zamenhof: lernejo en Togolando instruas Esperanton



En 2004 malfermiĝis la pordoj de la lernejo Instituto Zamenhof en Lome, Togolando.

Proksimume 200 ge-knaboj inter 4 kaj 20 jaroj eklernis tie kun kresko taksata je 75 % en iu jaro. La precipa celo de la instituto estas lukti kontraŭ analfabeteco, malfermi la mondon al la geknaboj pere de Esperanto kaj helpi ilin regi paraktikajn aferojn gravajn por ilia vivado. Abundas la problemoj, ĉar mankas monrimedoj al gepatroj por helpi siajn geflojn viziti lernejon. Jen

do ekstertogolandanoj helpas, pagante la lernokotizon (75 eŭroj por unu lernanto). Estas nun pli da subtenindaj infanoj ol da adoptantoj.

Aplikatas en la lernejo la instru-programoj oficialaj en Togolando. Estas du niveloj: la elementa kaj la meza. En la unua jaro de funkciado de la instituto estis tri el ses klasoj de la elementa nivelo, kaj tri el kvar de la meza nivelo. En ĉiu jaro aldoniĝas plia klaso ĝis kompleta nivelo en ĉiu grado. Nun nur la mezniveluloj lernas Esperanton, kies instruado komenciĝis la 1-an de novembro

2004. Ĉio iras glate kaj ĉe la fino de ĉiu lerneja jaro okazas premidisdono al gelernantoj bonaj. La unua okazis la 6-an de julio 2005. Sekvaj okazos en julio de ĉiu jaro. La instituto pretas ricevi viajn donacojn por tio ĝi.

La Instituto povas gastigi Esperantistojn vizitantajn Togolandon. Plie, la gelernantoj ege atas paroli kun fremduloj. Ĉiuj Esperantistoj estas bonvenaj en la Instituto Zamenhof de Togolando. Preskaŭ ĉiuj laborantoj de la instituto parolas Esperanton.

Krome IZO gastigis la Afrikan Oficejon de UEA de septembro 2004 ghis decembro 2005, kaj poste la sendependan Afrikan Centron Esperantistan. En IZO okazis kaj regule okazas seminarioj, kursoj, kunvenoj.

En 2007 aperis en Nederlando nova filmeto sur DVD-disko, 12-minuta pri la historio de Instituto Zamenhof.

La filmeto estas trifoje registrita sur la lumdisko, en la nederlanda, en la franca kaj en esperanto. Ĝi celas interesi unuavice neesperantistojn.

Laŭ interretaj informoj i.a. ĉe www.uea.org

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet
ISSN 0014-0694
Aprilo 2009 • 97-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson
Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:
EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42
Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se
E-post: esperanto@globalnet.net
Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm
Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm
Tryck: Al-fab-eto, Skövde
Prenumeration 2009: 200 kr.
Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem
savgiften.
Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00
E-post: sveda@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se
Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!
Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet
Medlemsavgift 2009:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar
under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,
Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG
Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona
E-post: eldona@telia.com Telefon: 0705-850054.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se
Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11
961 76 Boden, tel. 0921-123 54
e-post: esperanto@globalnet.net

| | Stoppdatum | Utkommer senast |
|------|--------------|-----------------|
| Nr 1 | 15 januari | 15 februari |
| Nr 2 | 28 februari | 30 mars |
| Nr 3 | 30 april | 31 maj |
| Nr 4 | 15 augusti | 15 september |
| Nr 5 | 30 september | 31 oktober |
| Nr 6 | 31 oktober | 30 november |

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har
brådskande information som måste komma ut
senast ett visst datum bör ta kontakt med redak-
tören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Karin Nordström



Kie vi naskiĝis?
En Gotenburgo

Kie vi loĝas?
En Hernusando

Pri kio vi laboras?
Mi kunkonstruas digitalan arĥiv-
egon pri internaciaj pactenaj misioj
por faciligi esploron tiutere.

*Kiujn interesojn vi havas krom Espe-
ranto?*

Mi estas estrarano en JAK Mem-
brobanko kiu estas senrentuma
membroposedata banko. Ĝi baldaŭ
havos esperantan tradukon ĉe
www.jak.se/int. Krom tio mi muzi-
kumas, ĉefe en la esperanta muzik-
grupo "La Perdita Generacio",
politikumas, legas librojn kaj ĉise-
zone skikuras kaj teumas kun
amikoj.

Ĉu vi havas familion?

Jes, du kunloĝantojn – Tomio kaj
Momo – kaj cetere proksimajn
amindajn amikojn.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?
Mi interesiĝis pri la lingvo dum la
lastaj 10 jaroj sed ne vere komencis
lerni ĝin ĝis 2005.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en
la Esperanto-movado?*

Laŭ mi, la plej grava tasko estas uzi
la lingvon ofte kaj diversmaniere; en
La Perdita Generacio, dum pasporta
servumado, retbabeleje, skribe k.t.p.
Krom tio mi estas sekretario en la
vigla Hernusanda Esperantista Klu-
bo ☺

*Kiu estas via preferata libro en Espe-
ranto?*

Plupo kaj la lupolo!

Ĉu ekzistas aliaj interesaĵoj pri vi?

Mi estas biciklemulo kaj esperas
partopreni la antaŭ-IJKan kara-
vanon ĉi-somere. Malgraŭ ke mi es-
tas sufiĉe nova en la esperanta
movado, mi ricevis mian unuan es-
perantolibron de Jim Hornö kiam mi
estis infano ☺

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

REDAKCIE

Multaj helpas

La saman vesperon kiam mi skribas
la lastajn liniojn de tiu ĉi revuo
ankoraŭ du esperantistoj kontaktas
min, unu retpoŝte kaj la alia telefone
por peti min enigi lastatempajn
informojn pri diversaj aferoj.

Kompreneble mia tasko kiel
redaktoro de la revo fariĝas pli facila
ĉar multaj homoj sendas al mi
materialon.

Iam oni diras ke nuntempe homoj
ne volas aktivigi en societoj. Mi ofte
povas konstati la malon.

Mi tamen ankaŭ konstatas ke
ankoraŭ multaj homoj ne scias pri
Esperanto. Tial ni senĉese laboru kaj
samtempe ĝuu ke ni jam povas
utiligi Esperanton!

Leif Nordenstorm
Via redaktoro


SÖKES: korespondent till
Världsmédborgarregistret i Paris.
Utfärdar ett numrerat svenskt
certifikat med foto och födelseort, som
personligt bevis på registrering med
kopia till Parisregistret.
Korespondenten får inte uttala sig
på de registrerades vägnar.
Att registrera sig som världs-
medborgare innebär endast
en personlig och helt opolitisk
deklaration om jämlikhet med
övriga medpassagerare på
rymdskeppet Tellus. Är inget pass!
Invandrare som inte längre tror på
nationalistiska myter kan svara så
här när de blir tillfrågade om sin
nationalitet:
"Jag är en världsmedborgare som
föddes i x-x-land och nu bor i y-y-
land" Har känts som en lättnad för
många.
Ser du dig själv som övertygad
världsmedborgare och har lust att
vidga den kretsen, skriv eller ring till
lars-gunnar.ekgard@bredband.net
Tel 018-71 32 85. Läs mer på
www.recim.org/cdm/registry.htm
med texter på esperanto, engelska
eller franska.

Dalhalla, la natura operejo

Rapport från ett möte

En unu de la plej belaj regionoj en Svedio, la lago Siljan en Dalekarlio, situas operejo mondfama.

Pentekoste 1991 visio pri Dalhalla estis vekita. La antaŭa opera kantistino kaj radioproduktisto Margareta Dellefors de longe serĉis someran festivallokon kaj Åsa Nyman, tiama kulturestrino en Rättvik "trovis" la kalkfosejon, kiun oni ne plu uzis. La situo estis perfekta, longe for de konstruaĵoj, vojoj kaj industrioj. La loko en si mem estis travivaĵo por okuloj kaj oreloj. Estis kiel scenejo, Valhall, de Wagnera mondo sed situata en Dalekarlio. Sekve Margareta Dellefors nomis ĝin Dalhalla.



Fotoj:
Johannes
Scherman

En junio 1993 estis sukcesa testa koncerto kun invitita publiko, gazetoj kaj televido. En la sama jaro oni fondis la asocion "Amikoj de Dalhalla". La 23-an de julio 1994 okazis la unua koncerto. Birgit Nilsson, la mondfama opera kantistino kaj ankaŭ honora prezidanto de Amikoj de Dalhalla, pafis la startigan pafon. La oficiala inaŭguro

de Dalhalla okazis la 21-an de junio 1995 kun granda operakonzerto. La sveda televido elsendis la koncerton kaj nun Dalhalla estas konata en la tuta Svedio. 1996 estis la unua provo kun vera opero. Estis montrita mallongajn pecojn de "La ringo de Niebelungen". Ĝi estis granda sukceso, ankaŭ internacie.

La unua internacia opera kunlaboro okazis 1998. Estis "Nabucco" de Verdi kune kun la Latva Nacia Opero en Rigo. La mondfama opera tenoro José Cura gastigis Dalhalla 1999. La kunlaboro kun aliaj kreskis. Savonlinna opera festivalo en Finnlando kaj la Estona Nacia Opero ludis operojn en Dalhalla. De Usono venis "New York Harlem Theater" kun Porgy kaj Bess kaj de Ruslando venis La Bolŝoj-teatro en Moskvo kun Turandot.

Dalhalla havas nuntempe 4000 sidlokojn. Ne nur operojn oni ludas sed ankaŭ popmuzikon, rokmuzikon kaj spektaklojn. Dalhalla atingis novan publikan rekordon en 2006 kun 108 000 koncertaj vizitantoj. Dalhalla nun estas komparebla kun la plej famaj scenejoj en Eŭropo. Rättvik nun havas lokon sur la internacia muzika mapo. Ĝis nun ĉirkaŭ 60 milionoj kronoj estas investitaj en Dalhalla.

La historio ne finiĝas ĉi tie. Mi volas diri ke ĝi komenciĝis antaŭ 360 milionoj jaroj. Tiatempe granda meteorŝtono falis teren ĵus en tiu regiono. La rezulto estas "La ringo de Siljan". En nia tempo oni elfosis la kalkon por diversa uzado. Rezultoj de la ekspluatado estas la tre granda truo, kiu estis kreita inter 1948 kaj 1990. Estas en tiu truo la scenejo nuntempe situas.

Somere Dalhalla estas montrata de specialaj gvidantoj kaj ni faros ekskurson tien dum la SEF-kongreso. Certe ni tiam aŭskultos pli de nia Dalhalla gvidanto pri tiuj interesaj aferoj.

Åke Rohdin

Vad ĝi egeblas? Svenska Esperantoförbundets styrelse? Här kommer en rapport från mötet den 25 januari 2009.

De viktigaste punkterna på dagordningen hade att göra med förbundets ekonomi och förberedelserna inför den kommande årskongressen 22-24 maj i Borlänge. En värdering av fonderna ska göras innan bokslutet fastställs, samt en översyn av placeringen av våra likvida medel. Verksamhetsplanen för i år måste bli restriktiv pga den ekonomiska situationen. Wim Posthuma utsågs till ansvarig för en kampanj för att värva nya medlemmar i Rondo Langlet.

Vi rapporterade för varandra om våra kontakter med klubbar och direktmedlemmar. Dessa kontakter har mottagits positivt och kommer att fortsätta. Klubbarna uppmanas att skicka in material till La Espero samt att skicka sina verksamhetsrapporter för 2008 för att vi ska kunna få med uppgifter ur dem i SEF:s årsrapport.

Förutom praktiska frågor och beslut om den nuvarande verksamheten ventilerades även idéer inför framtiden, där vi hoppas att få stöd och hjälp från klubbar och enskilda medlemmar. Vi ser därför fram emot ett stort deltagande i årskongressen i Borlänge och i den träff på fredagskvällen, som Svenska Esperanto-Institutet kommer att inbjuda till.

Kongressens huvudtema kommer att vara det engelska projektet "Springboard to Languages * /Lingvolanĉilo", ett program för att med hjälp av esperanto få engelska skolelever att bli medvetna om hur språk fungerar och göra dem intresserade av att lära sig främmande språk.

Ann-Louise Åkerlund

* Springboard to Languages (engelska): På svenska "En språngbräda till språk". En språngbräda är en sviktande bräda för avstamp vid gymnastikhopp.



Programo de la jarkongreso en Borlänge 22-24 majo 2009

Aliĝu frue! Se vi aliĝas antaŭ 15 aprilo, vi havos pli favoran prezon.

Informoj pri la jarkongreso: sefkongr09@esperanto.se, aŭ numero 1 de La Espero, aŭ interreta paĝaro www.esperanto.se, aŭ la adreso kaj telefono de SEF.

Vendrede

18.00-19.00 Jarkunveno Sveda Esperanto-Instituto
19.00- Plankunveno kun vespera kafo

Sabate

09.00-10.00 Jarkunveno Eldona Societo Esperanto
10.00-10.30 Kafo
10.30-12.00 Prelego Gubbins
12.00-13.00 Lunĉo
13.00-14.30 Jarkunveno Sveda Esperanto-Federacio
14.30-15.00 Kafo
15.00-16.00 Prelego Gällmo
16.00-17.00 Jarkunveno ILEI.se
19.00-22.00 Supeo kaj distraĵoj

Söndag

09.00-09.30 Diservo
09.30-10.30 Jarkunveno Sveda sekcio de KELI
Jarkunveno Esperanto-Gastejo
10.30-11.00 Kafo
11.00-12.30 Diskuto Gubbins kaj invitita instruisto pri lingvaj demandoj
12.30-13.30 Lunch

Kallelse till Svenska Esperanto-Institutets årsmöte

fredagen den 22 maj 2009 kl. 1800

på Fornby folkhögskola, Borlänge

Alla medlemsorganisationer välkomna!

Efter årsmötet är alla esperantoorganisationer samt andra intresserade välkomna att delta i ett planerings- och framtidsmöte om esperantorörelsen i Sverige. Vad skulle svensk esperantorörelse behöva göra framöver? Vad kan den göra? Hur organiserar vi detta? Bengt Nordlöf inleder 15-20 minuter, därefter gruppdiskussioner. Återsamlingen leds av Lars Forsman och Ann-Louise Åkerlund.

Kaffe serveras under kvällen.

Styrelsen för Svenska Esperanto-Institutet

Kallelse till årsmöte för Förlagsföreningen Esperanto

Lördagen 23 maj 2009 kl. 9.00

på Fornby folkhögskola, Borlänge

Styrelsen

Kallelse till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet

Lördagen 23 maj 2009 kl. 13.00

på Fornby folkhögskola, Borlänge

Styrelsen

Alvoko al jarkunveno de Esperanto-Gastejo

La membroj de Esperanto-Gastejo ekonomia kooperativo estas vokataj al jarkunveno en Fornby popolaltlernejo, Borlänge, Svedujo, dimanĉe la 24-a de majo 2009 je la 9.00-a horo. Traktotaj aferoj: La la statutoj, §16. Vidu je <http://e-g.se/statutoj> Bonvenon! Medlemmar i Esperanto-Gården ek. för. kallas till föreningsstämma på Fornby folkhögskola, Borlänge, söndag den 24 maj 2009 kl. 9.00

La estraro

Tester och examina

Esperantos position i organisationen Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo (ALTE) har förstärkts genom att Kultura Centro Esperantista har utsett Elisabeth Amstad, språklärare i tyska, franska och esperanto, som sin ständiga representant. Nästa ordinare sammankomst i ALTE inträffar i Santiago de Compostela i slutet av april.

Det finns nu tre parallella internationella examenssystem i esperantosamhället. De examina i två nivåer, som länge tillämpats, finns fortfarande. UEA utgav förra året en reviderad upplaga av "Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA", som brukar användas som förberedelse för dessa.

Vidare finns sedan 2007 de nya Europaråds-anpassade testerna administrerade av Kultura Centro Esperantista i Schweiz. Dessa har sex nivåer från A1 till C2, varav dock de två enklaste A1 och A2 inte brukar aktualiseras, eftersom de för esperantos del anses alltför enkla.

I princip samma typ av tester finns hos det ungerska institutet Eötvös Loránd Universitato (ELTE), som via UEA från och med i år erbjuder tester för nivåerna B1, B2 och C1 också utanför Ungern. I dessa tester krävs inte, enligt uppgift från Bengt Nordlöf i La Espero 2009:1, kunskaper i esperantos historia och kultur, vilket fortfarande krävs i ILEI:s och KCE:s examina och tester.

De tre typerna av examina/tester kan genomföras på platser och vid tillfällen då examinatore befinner sig på plats, men det finns också planer att ge lokala testrättigheter åt andra organisationer, som kan uppvisa tillräcklig kompetens.

Agneta Emanuelsson
Bertil Nilsson

Krukpenso

Kiam ni maljuniĝas, la unua afero kiu kadukiĝas estas la memoro.

Mi ne memoras kiu estas la dua afero....

Alergio

En la laborejo, Lio plendas: Mi timas ke mi fariĝas alerga je mia hundo.

Kruko: Ĉu vere?

Lio: Jes. Ĉiufoje kiam mi proksimiĝas je ĝi, miaj okuloj ekŝvelas kaj mi ekploras.

Kruko: He! Mi havas la saman reagon kiam mi venas al la oficejo.

Lio: Normale! Ĉiu scias ke vi estas alerga je laboro!

Tute

Amanda telephone: Kiam mi diras ke mi alvokos vin kaj mi ne alvokas vin, mi ne komprenas kial vi ne alvokas min por demandi kial mi ne alvokis vin!

Kia glaso!

Kruko montras glason al Baniko: Ban jo, ĉu ĉi tiu glaso estas duonplena aŭ duonmalplena?

Baniko: Ĝi estas plasta.

Kruko: Vi ne komprenas.

Baniko: Ĉu?

Kruko: Vidu: se vi diras ke la glaso estas duonplena, vi estas optimisto; se vi diras ke ĝi estas duonmalplena, vi estas pesimisto. Ĉu vi vidas?

Baniko: Mi bone vidas ke estas insekto en ĝi!

Kruko levas la brakojn kaj foriras.

Baniko pripensas al si: Sed mi daŭre ne komprenas ke se mi diras ke la glaso estas duonplena, mi estas optikisto - mi fakte ne bone vidas tion!

Amindumo

Posttagmezo, la sesa horo, ekstere neĝas. Malhelas. En la ĉambro lumas nur la fajro. Juna juristo paroladas kun junulino:

- Diru, kion vi farus, se mi nun kiskus vin?

- Por tio vi estas tre...

- Nu, se tamen?

- Ĉu vi aŭdacus fari tion?

- Mi nur demandas, kion vi farus?

- Mi krie venigus panjon!

Elemér (elemer'), la juristo, perdis sian bonhumoron, li etendis la manon al sia ĉapelo, peza gemo pro rezigno flugis el lia brusto.

- Adiaŭ, kara fraŭlino!

Irén (iren') iomete gapece rigardis lin, poste ekridis.

- Stulteta viro vi estas, Elemer, ja mia panjo ne estas hejme.

Mitt liv som esperantist och årets kongress

I backspegeln verkar det obegripligt, oförlåtligt och synnerligen oklokt. Detta att jag är född esperantist, när det gäller idén; alltså väl känt till vårt språks möjligheter. Men ändå fick det gå 57 år innan jag ordentligt lärde mig språket. Då hade jag under 45 år påbörjat åtminstone tjugo nybörjarkurser men avslutat ytterst få. Men med Lars Forsmans och Natasha och Anders Bertses hjälp i Karlskoga blev det fart 1994.

Sen gällde det att ta igen så mycket som möjligt av det som gått förlorat av livet i Esperantujo. Vistas intensivt i esperantomiljöer. Så många svenska och internationella esperantoarrangemang som pengarna räckte till. Tidig pensionering gjorde det möjligt att ägna mycket tid åt sverigedelen av Esperantujo, SEF, förlagsföreningen och inte minst Esperanto-Gården. Och nu flyter språket på rätt bra.

Just nu har jag den kanske roligaste uppgiften hittills. (Nåja, att arbeta med sommarkurserna i Lesjöfors har också varit mycket givande.) Men just nu gäller det att hjälpa till och ordna den svenska kongressen i Dalarna, på hemmaplan. I Tunabygden. Familjen Björlings hemtrakter. Fast för mig personligen var Joppla, John hette han egentligen, större än Jussi. Joppla spelade jazzklarinet och fiol i de mest berömda storbanden i USA. Sen, på 50-talet, kom han hem till Borlänge och startade storband. Den andre av Borlänges stora klarinettister är än mer känd, Putte Wickman.

Från bruksorten Kvarnsveden, min del av stan, kom också kända artister. Sångerskan Lilly Berglund, pianisten Lars Roos och operasångaren Sven-Erik Vikström är väl de mest kända.

Så nog kommer vi kongressdeltagare till en kulturborg. Men det finns natur också. Fem minuters promenad från Fornby folkhögskola, platsen för vår kongress, finns Frostbrunnsdalen. Ett naturområde med 344 växtarter. Där finns bland annat trefaldighetskällan, som genom att den rinner mot norr varit kultplats också i förkristen tid, sedan urminnes tider säger man. (Google gärna på Frostbrunnsdalen.) Dalen har även kallats Dalarnas viktigaste kulturplats.

Under heldagsutflykten blir det andra kultur- och naturupplevelser varav huvudinslagen presenteras på andra platser i tidningen. Jag kan bara komplettera med att jag sen sist besökt Klockargården i Tällberg vid Siljan, och funnit att den väl motsvarar vad vi kan önska oss i form av mat och miljö.

Strutsarna som strosar på strutsfarmen i Stora Tuna tillsammans med *dromaeus novae-hollandiae*, även kallad australisk struts får vi nog bara se från bussfönstret. Besök i Torsångs mycket gamla kyrka, eller bilmuseet intill, gör att tiden inte räcker. Men den spännigaste kan promenera till strutsarna.

Om själva kongressinnehållet står det också på annan plats och i tidigare nummer av *Espero*. Verkar det inte tilldragande?

Väl mött i Borlänge.

Bengt Nordlöf



Ekstereŭropaj esperantistoj en Svedio

La artikolo en n-ro 1 pri ekster-eŭropaj esperantistoj vekis al mi memorojn el miaj infanaj jaroj, kiam vivis kaj floris la esperantoklubo de Östanbo ekster Söderhamn. En la postlasita gastlibro de miaj gepatroj Runo kaj Signe Stridell troviĝas fotoj kaj dankskriboj de pluraj vizitintoj eksterlandaj, inter aliaj Hadzi Raden Mustapha (5/10 1934), Lakshmiswar Sinha (19/11-34 kaj 30/6-38), kaj Kola Ajayi (11/4-38).



Sur la bildo staras ekster mia hejmo la "Tirola Kvarteto Esperanto", kiu amuzis la vilaĝanojn per muziko, danco kaj jodlado. Antaŭe staras Lakshmiswar Sinha portante mian frateton Kaj (preskaŭ 3-jara); ĉiuj ambaŭflankitaj de du klubanoj Astrid kaj Axel Danielsson. Maldekstre mia patrino kaj mi mem, 8-jara.



Pri Mustapha mi memoras ke laŭdire post liaj vizitoj li kutimis sendi demandaron, ĉu lia konduto iamaniere diferencis al la okcidenta modelo. koncerne Kola Ajayi, la apero de nigra persono kompreneble tiutempe estis granda sensacio por la klubanoj. Kiam li foje sidiĝis sur sofo ĉe du junulinoj, ili ektimis kaj metis sin flanken. Li tamen bone ridis, tuŝis la manon de unu el ili kaj diris: Vidu, mi ne delasas farbon!

La klubon, kiu siatempe kreskis ĝis ĉirkaŭ 80 membroj, vizitis ankoraŭ pluraj eksterlandanoj, tamen eŭropaj.

Esbjörn Stridell

Herbert Lindros

Herbert Lindros avled i slutet av januari, 93 år gammal.

Han var en helhjärtad esperantist under alla år, sedan den dag, sommaren 1934, då han upptäckte en hel sida i Dagens Nyheter med artiklar och annonser på esperanto. Det var nämligen UEA-kongress i Stockholm, och DN hade hel esperantosida varje dag under den veckan. Herbert satte genast igång att hitta läromedel och lära sig. Med tiden blev han så engagerad att han anmälde sig som delegat för Ljungby. Han blev även livstids medlem i UEA.

Jag besökte Herbert en dag i juni förra året. Vi fick ett långt samtal på esperanto, vilket visade hur kunnig han var. Han skrev gärna små poem på esperanto. I *La Espero* nr 3-2006 finns ett minnespoem efter hans vän Markheden. I nr 4-2008 kom ett minnespoem till Sigurd Olssons minne. Sigurd och Malte var medlemmar i Ljungbyklubben.

När jag kom in i Herberts finrum, låg det gamla exemplaret av DN på bordet. Det kändes viktigt för Herbert att ha tidningen kvar.

Nästan alla möblerna i huset var tillverkade av honom själv. Han hade ju arbetat som möbelsnickare, och höll fortfarande på ett antal timmar i veckan, med diverse skåp och stolar, i sina egna snickarbodar.

Tre gamla duktiga esperantister i Ljungbyklubben har avlidit på kort tid. De två återstående medlemmarna blir nu direktmedlemmar i SEF. Jag hoppas att den energiske Dag Ellard kan finna nya personer som vill bli medlemmar.

Roland Lindblom

Böcker bortskänkes

I förra numret av *La Espero* kunde vi läsa att Esperantoförlaget kan tänka sig att skänka vissa böcker till grundskolor, gymnasier, folkhögskolor och universitet och kommunala bibliotek.

De som vill hjälpa till att förmedla böcker kan ta kontakt med Anita Dagnarsdotter på eldona@telia.com eller telefon 031-55 53 37.

Detta gäller fortfarande men vi vill förtydliga att förlaget inte betalar porto. Klubbar och enskilda som vill förmedla gåvor får komma överens om hur böckerna skall hämtas.

Efter 10 augusti till år 2008:s slut har det kommit gåvor för olika ändamål från diverse givare till minne av Karl Buremo och Sigurd Olsson, samt från Roland Lindblom, Ulla Luin, Martin Persson, Esbjörn Stridell och Åke Waller. Totalt har under året inkommit 20 070 kr som gåvor. Genom Rondo Langlet har totalt inkommit 32 460 kr.

Gåvor till SEF 2009 fram till 10 mars Till minne av Herbert Lindqvist och Herbert Lindros, båda från Ljungby genom Bjerstafs Begravningsbyrå AB och Wickmans Begravningsbyrå samt Solveig Ohlson, USA. Dessutom gåvor till verksamheten från Leif Holmlund, Jan-Erik Höglund, Gunnar Jonsson Thordis Samuelsson. Sammanlagt för 2009 hittills 1 900 kr. Genom Rondo Langlet har inkommit 12 052 kr under året Alla bidrag till verksamheten är välkomna, stora som små. De är nödvändiga för ett aktivt arbete och styrelsen tackar hjärtligt för alla bidrag.

TRA LA LANDO

Nova retpaĝo

La sveda interreta paĝaro www.esperanto.se havas novan parton de la menuo, kun svedlingvaj informoj pri aliĝo al jarkongreso, kaj kun ligilo por aliĝo al UK. Ĝi havas la nomon "Kongressanmälan" en la menuo.

La sveda interreta paĝaro direktas sin unuavice al tiuj kiuj parolas la svedan, kaj deziras scii iom pri esperanto. Tial la tekstoj estas svedlingvaj, kvankam tiuj ĉi informoj ja direktas sin ĉefe al membroj.

Plej laste en la paĝaro troviĝas paĝo por esperantistoj, kun tekstoj en esperanto, kiuj direktas sin al esperantistoj en aliaj landoj. Tiu paĝo havas portempe novan nomon, "Sveda jarkongreso 2009", kaj tie troviĝas informoj pri aliĝo al la jarongreso por eksterlandaj partoprenantoj. La ĝenerala informteksto en esperanto daŭre estas tie, sed iom pli sube.

Raporto de Skövde

Skövde Esperantoklubb komencas la jaron 2009 kun nova prezidanto. Karl-Gustaf Gustafsson deziris rezigni kiel prezidanto, kaj anstataŭe la jarkunveno elektis Hilgon Frisk kiel prezidanto.

La klubo havis pasintjare 24 membrojn. Mortis du veteranaj membroj, 100-jara Kurt Rohdin kaj estinta prezidanto Gunnar Ringh.

Dum jaro 2008 la klubo havis dek kunvenojn kaj du ekskursojn. En literatur- kaj lingvokurso partoprenis sep membroj. Kvar membroj partoprenis la SEF-kongreson. Krome Karl-Gustaf Gustafsson kaj Birgitta Anevik partoprenis la Oceanan kongreson en Nov-Zelando, kaj Gunnar Olsson partoprenis la UEA-kongreson kaj aranĝojn en Hindujo kaj Germanio. Karl-Gustaf Gustafsson daŭrigis distancinstruadon en interreto

Carl-Erik Ohlsson kaj Solveig Bertilsson daŭrigis la prizorgojn de La Espero, kaj presadon kaj distribuadon.

Börje Andersson

...kaj de Umeå

La klubo konsistas el tri membroj. ABF reklamis pri Esperanto-kurso en sia programo, sed ne aliĝis sufiĉe da homoj. La membro Åke Waller skribas: "mi tamen ne rezignis, sed klopodas interesi ne nur gejunulojn sed ankaŭ maljunulojn."

La Espero deziras bonan sukceson!

...kaj de Upsalo

La 18an de februaro estis jarkunveno en Uppsala kaj oni elektis novan estraron.

Jen la nova estraro:

Prezidanto: Johan Krig Ölund
johan.kr@gmail.com

Sekretario: Carl Mäsak
cmasak@gmail.com

Kasisto: Martin Kjellin
martin.kjellin@sobernet.nu

Magnus P



Kunveno

Junaj esperantistoj kunvenos en Borlänge, 22-24 majo 2009, en sama loko kaj sama tempo kiel la jarkongreso de SEF. La kunveno havos la nomon "Anemona Renkontiĝo".

Pri aliĝoj kaj partopreno, informoj venos en la interreta paĝaro de SEJU

Prelego en Södra Latin

La 4-an de Marto prelegis dum du horoj SEJU, reprezentata de Carl Mäsak kaj Robin Rönnlund, en la gimnazio Södra Latin en Stokholmo. La publiko konsistis el lingvolernantoj, kiuj starigis profundajn kaj interesitajn demandojn pri la lingvo. Inter la temoj priprelegitaj troviĝas baza gramatiko, junulkulturo, slango, sakraĵoj kaj internacia kontaktado per Esperanto.

Carl Mäsak



Sommarkurser på Braheskolan

I samarbete med Braheskolan på Visingsö ordnar Svenska Esperanto-Institutet två sommarkurser under fem dagar i juli.

Esperanto: grundkurs

Eftersom esperanto är gjort för att vara lätt att lära sig, ger den här kursen deltagarna tillräckligt med kunskaper för att kunna kommunicera på vardagsnivå. Man får också inblickar i språkets intressanta historia, dess litteratur, dess roll i dagens globaliserade värld etc.

Tid: 20 – 24 juli 2009

Pris: 2800 kr. Priset omfattar kurs, kost och logi på folkhögskolan.

Esperanto: att skriva filmmanus Kursens syfte är att ta fram manus till en eller flera kortfilmer på esperanto. Deltagarna bör ha intresse för film; kunskaper i esperanto är en fördel. Utgångspunkt för arbetet kan vara egna idéer men också färdiga noveller etc. Handledning ges av kursledarna. Inspelning kan bli aktuell en kommande sommar.

Tid: 20 – 24 juli 2009

Pris: 2800 kr. Priset omfattar kurs, kost och logi på folkhögskolan.

Läs mer om Visingsö på www.visingso.net

Anmälan och information: <http://www.folkuniversitetet.se/templates/ort.aspx?id=2411>



Sommarkurs på EsperantoGården

Årets sommarkurs på EsperantoGården inträffar från söndag 12 juli till söndag 19 juli 2009 i Lesjöfors, Värmland. Kursutbud, schema och priser, se <http://e-g.se/> eller ring 0590-309 09.

Olika nivåer!

KOSSIVI Massan
Judith, 14- jara
(04/05/1994)
lernantino en la
Instituto Zamenhof
en la lasta klaso de
mezlernejo, serĉas
esperantajn
korespondantojn
en la tuta mondo.
Ŝi ŝatas korespondi
pri ĉiuj temoj. Ŝia
retadreso estas :
[judithkossivi
@yahoo.fr](mailto:judithkossivi@yahoo.fr)
La poŝta adreso
estas :
11 BP 48 Lome 11
Togo.

TRA LA MONDO

Tradukilo uzas Esperanton

La administrantoj de la traduk-programaro Apertium komencis evoluigi version por aŭtomata tradukado el la angla al Esperanto. La teknologio estis origine evoluigita de la Universitato de Alakanto en Hispanio por aŭtomata tradukado inter proksimaj lingvoj, kiel la hispana kaj la kataluna. Kataluna Esperanto-Asocio kaj Hector Alòs i Font antaŭ unu jaro kunlaboris en la projekto, kaj al la programo estis aldonitaj versioj por traduko el la hispana kaj el la kataluna al Esperanto. Nun la dana esperantisto kaj programisto Jacob Nordfalk kunlaboras kun la teamo por aldoni tradukon el la angla al Esperanto. Libera Folio petis ilin klarigi, pri kio temas kaj por kio utilas la projekto.

www.liberafolio.org

En la Eŭropa Parlamento

La propono de Ljudmila Novak pri enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo de Eŭropa Unio estis malaprobata post voĉdono en la komitato pri kulturo kaj eduko de la Eŭropa Parlamento. Eĉ Ljudmila Novak mem ne atendis alian rezulton, sed ja esperis, ke ŝia propono kondukos al iom da publika diskuto pri Esperanto. La afero efektive ricevis iom da publika atento almenaŭ en Hispanio. Tie iom surprize montriĝis, ke ekzistis aldone dua, konkuranta amendopropono kun mencio de Esperanto. Ankaŭ ĝi estis rifuzita, kaj la originala vortumo de la raporto pri multlingveco estis aprobata per 20 poraj voĉoj, 3 kontraŭaj voĉoj kaj 8 sindetenoj.

www.liberafolio.org

Kleriga lundo

Kleriga tago okazos denove en la kongreso en Bjalistoko, nome lundon la 27 julio. La estraro de UEA bonvenigas proponojn pri kontribuoj. Estos la sepa fojo de okazigo de tiu interesa kaj populara aranĝo.

UEA vendis por 125125 Eŭroj

Kun 349 ekzempleroj la gvidilo "Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA", lanĉita en la 93-a UK, estis la plej furora titolo de la Libroservo de UEA en 2008. "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker (229) estis la tria; la duan lokon okupis la adresaro de Pasporta Servo (284). Furoris ankaŭ la artikolaro de Ulrich Lins pri la historio de UEA, "Utila Estas Aliĝo" (214), aperinta en la antaŭlasta tago de la UK.

Ses pliaj libroj atingis pli ol 100-ekzempleran kvanton: la ekzercilo "Poŝamiko" de B. Allée kaj K. Kováts (186), "Gerda malaperis!" de Claude Piron (181), la gvidilo pri la kvartalo de la CO "Tuj apude" de Humphrey Tonkin (170), la enkonduka libreto "La Komuna Eŭropa Referenckadro" (145), la elementa lernolibro "Saluton!" de A. Childs-Mee (107) kaj "Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj" de R. Bolt (106).

La vendoj sumiĝis je 125125 EUR (122420 en 2007).

1275 aliĝis

1275 kongresanoj el 59 landoj aliĝis al la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko (25 julio – 1 aŭgusto 2009) ĝis la 15-a de februaro. Je la sama dato la 93-a UK en Roterdamo, kies fina nombro de kongresanoj estis 1845, havis 1195 aliĝintojn. Ĉe la pinto de la provizora statistiko de Bjalistoko estis Pollando kun 219 aliĝoj. Tre proksime, kun 192 aliĝoj, sekvis Francio, kiu jam en la statistikoj de la Florenca kaj Roterdama UK-oj venkis la gastigantan landon kaj almenaŭ teorie ankoraŭ povos ripeti la samon ĉi-jare. Pli ol 100 aliĝintojn liveris ankaŭ Germanio (114) kaj Japanio (112). El aliaj landoj estis registritaj signife malpli grandaj nombroj. Pli ol 30 aliĝintoj venis el Nederlando (53), Italio (46), Ĉeĥio (45), Belgio (42), Rusio (38), Brazilo (37), kaj Litovio (31).



LINGVO

Lingvotago

Förberedelserna inför Europeiska språkdagen (EDL, European Day of Languages) 2009 har så sakteliga börjat komma igång. Språkdagen infaller den 26 september, vilket i år dock är en lördag, varför aktiviteterna i Stockholm troligen kommer att äga rum på måndagen 28 september för att passa bättre för skolklasser, och för att inte i samma utsträckning konkurrera med Bok & Biblioteksmässan i Göteborg 24–27 september. Det föreslagna temat för årets språkdag är flerspråkighet och "Världens språk i Europa". Mer information om vilka aktiviteter som är planerade kommer förstas i senare nummer av La Espero, men vi vill ändå redan nu uppmana alla klubbar ute i landet att fundera på tänkbara aktiviteter som att ordna (eller delta i) språkkaféer eller ha bokbord och informera om esperanto t.ex. på era lokala bibliotek.

Olof Pettersson

'På kongresejot'

Esperanto har ett fantastiskt ordbildningssystem med många affix (tilläggsstavelser). Med stavelsen *-ejo* uttrycker man platsen för något. Kafo betyder kaffe och kafejo blir alltså kafé. Kongreso betyder kongress och kongresejo betyder alltså... Ja här saknas alltså en direkt motsvarighet på svenska. Kongresejo kaj betyda konferensanläggning men också helt enkelt platsen för en kongress.

I manuskript till La Espero dyker ofta ord som kongresejo upp i svenska texter, men som redaktör brukar jag oftast översätta dem, eftersom det inte är lyckat att blanda språk hur som helst. När det gäller vår kommande kongress i Borlänge kan kongresejo översättas med t.ex. "platsen för kongressen" eller "folkhögskolan" eftersom just den kongressen kommer att vara på en folkhögskola.

Det är inte heller bra om man lägger in ord som delegito (delegat), kabei (sluta med esperanto) eller krokodili (tala andra språk på en esperantoträff) i en text på svenska.

Språkblandingar blir sällan lyckade. Visst får vi vara glada över de unika ord som finns på esperanto, men de går faktiskt att översätta till svenska.

Leif Nordenstorm

RECENZOJ

Mi iĝos 90-jara la 14-an de majo, Ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj la 14-an de majo je la 12-a manĝi sandviĉan torton kun kafo kaj memfaritan torton. Arne Lundkvist Kyrkogatan 32, 331 31 Värnamo 0370-494 48 070-600 43 01

Pri milito, amo kaj diktaturo

Ĉu vi konas Blaise Cendrars? Manuel de Seabra. 12.30 eŭroj ĉe UEA. Vieno, 2007. IEM.



La sendependiga milito en Angolo ĉesis en 1975. Tiu ĉi libro rakontas pri la periodo antaŭ kaj dum la milito. La kadra rakonto temas pri Konrado, soldato dum la milito, kiu ie kuŝas, ĉar lia kruro gambomeze forŝiriĝis pro mino sub lia ĵipo. En la libro interplektiĝas la memoroj de

Konrado. Jen li pensas pri okazaĵoj dum la milito, kaj pri kruelaĵoj, kaj pri la absurda prunteprenado de libroj inter kolonia kaj gerila soldatoj. (Unu el tiuj libroj estis verko de Blaise Cendrars, se vi scivolas pri la titolo.) Jen Konrado pensas pri amaferoj dum la juneco en la diktatura Portugalio.

Estas pli facile legi librojn en kiuj oni komencas en la komenco kaj finas en la fino. Manuel de Seabra uzas alian metodon. Li saltas tien kaj reen en la historio. Tio pli multe postulas de la leganto.

Ni tamen atendu ankaŭ alian aferon. La lingvaĵo de la libro estas ege viva kun mallongaj frazoj: "Liaj okuloj serĉas ĉiun ŝtonon. Ĉiun arbon. Liaj botoj apartigas ĉiun herban tufon en la vojborde. Kun funda angoro, li devias tra la alta herbo. Sentime pri la serpentoj. Aŭ pri minoj. Foje sonas krioj."

Legu malrapide kaj pripensu seriozan temon.

Leif Nordenstorn

TRA LA MONDO

Kultura Esperanto-Festivalo

La festivalo KEF denove okazos en Danio. Ĉi-foje estos en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. La datoj estas de la 7a ĝis la 12a de julio 2009.

Nun la 9an fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kulturajn Esperanto-Festivalon. Ĝi estas festivalo kie ni prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon. Generale la unuaj tagoj de la festivalo estas pli metiejaj kaj la lastaj tagoj estas pli distraj. La festivalo estas festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝos primitive kaj tiamaniere la kostoj ne estas tiel altaj, kvankam Danio estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi en migrulhejmo aŭ en hotelo por aldona kosto.

Amaso da bonaj konataj Esperanto-artistoj venos, ni menciui en hazarda ordo: Ĵomart kaj Natasha, Martin Wiese kaj la Talpoj, Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Pafklik kaj Jonas kaj pli junas. Flo de Vinilkosmo agadas, multaj amuzaj metiejaj okazos interalie infana rokgrupo ludos kaj prezentos sin. Vi povas spekti filmojn en Esperanto, legi kaj fari komiksojn, lerni poemi en Esperanto, partopreni dancatelieron kaj entute ĝui la plej grandan aranĝon kun Esperanto kulturo.

Vidu ĉe www.kef.saluton.dk pri pli da detaloj, la diversaj metiejaj kaj kotizo. Jen eltiraĵo:

Por A-landoj (Danio, Svedio, Norvegio, Germanio) la programo kostas:

| Aliĝperiodo | Aĝo < 20 | Aĝo < 30 | Aĝo 30+ |
|------------------------|----------|----------|---------|
| 1 (ĝis 5a de januaro) | 400 | 550 | 650 |
| 2 (ĝis 16a de aprilo) | 450 | 600 | 700 |
| 3 (post 15a de aprilo) | 550 | 700 | 800 |

| Unutagaj biletoj por ĉiuj | |
|---------------------------|-----|
| 1 (ĝis 5a de januaro) | 100 |
| 2 (ĝis 16a de aprilo) | 125 |
| 3 (post 16a de aprilo) | 150 |

kef-teamo, kef9@tejo.org

Beletra revuo el Nov-Jorko

Beletra Almanako. (Septembro 2007) N-ro 1 kostas 9.90 eŭroj ĉe UEA. Novjorko, 2007. Mondial.



Post Literatura Mondo, Norda Prismo kaj Fonto nun ekaperis nova literatura revuo. Redaktas: Jorge Camacho, Probal Daŝgupto kaj István Ertl. Eldonejo estas Mondial en Nov-Jorko, kiu eldonas kaj Esperantajn kaj nacilingvajn eldonojn. La unua numero havas 176 paĝojn kaj alton de 22 centimetroj. Apero: 2-3-foje jare.

La enhavo estas originalaj kaj tradukitaj poeziaĵoj kaj prozaĵoj, eseoj kaj recenzoj.

Bonan sukceson al nova revuo!

Leif Nordenstorn

Äntligen i ny upplaga:



Esperanto! Nyckel till det internationella språket har kommit i en ny upplaga. 15 x 10,5 cm. 48 s. Beställ flera till klubben eller för att ge bort till julklapp, 2 ex, 40 kr; 5 ex, 100 kr; 12 ex, 220 kr; 25 ex, 375 kr; 50 ex, 600 kr; 150 ex, 1200 kr.

Dessa priser inkl. porto.

Esperantoförlaget, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg, eldona@telia.com, 031 - 12 05 94 Information om andra böcker : www.algonet.se/~eldona